



ESPERANTO MONATO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

Kosto de abono por jaro: Skandinaviaj kronoj 4,00 — hungaraj kronoj 5,50 — frankoj 5,75 — rubloj 2,00 — germanaj markoj 4,50 — portugaliaj rejsoj 1200 — brazilaj rejsoj 2500 — dolaroj 1,25 — ŝilingoj 4¹/₂.

Pago por anoncoj: 15 oroj — 20 heleroj — 20 centimoj — 8 kopekoj — 15 pfenigoj por duonpaga petiltinio. — 10% rabato por duonjara, 25% rabato por tutjara anoncado; ĉe granda anoncado ankoraŭ pli da rabato laŭ reciproka konsento.

Adreso de l' redakcio: **Paul Nylén**, en la redakcio de »Vårt Land», **Stockholm**, Sverige (Svedujo). — Adreso de l' administracio: **Paul de Lengyel**, en **Szegvár**, Magyarországi (Hungarujo). — Kun manuskriptoj kaj ĉio tuŝanta la tekston oni sin turnu al la **redaktoro**; pri abono, ekspedado, anoncoj kaj ĉiuj monaj aferoj oni devas turni sin al la **administranto**.

Al tiuj estimataj esperantistoj, kiuj havis la bonecon sendi al ni siajn bondezirojn je la nova jaro 1901, ni kore dankas, kaj deziras al ili la plej plenan feliĉon.

Paul Nylén.

Paul de Lengyel.

ANKORAŬ UNU NOVA JARO.

Nian dankon kaj bonsaluton ni esprimas al niaj malnovaj amikoj, kiuj sekvis nin en la novan centjaron, kaj al tiuj, kiuj aliĝis al ni en la nova jaro, ni deziras plej kore bonvenon!

Pri la programo de la gazeto ni nun ne multe diros, nur ke ĝi daŭrigos sian vivon kaj agadon en ĉefe la sama maniero kiel ĝis nun.

Ni volas tamen paroli iom pri kelkaj aferoj, por ke oni sciu, kiamaniere plej bone kunlabori al la gazeto.

Unu el la plej gravaj partoj de la enhavo de l' gazeto estas la *Kroniko*. Por ke ĝi estu kiel eble plej ampleksa, bona kaj interesa, ni

bezonas en la plej multa grado la kunhelpadon de niaj estimataj legantoj en ĉiuj diversaj landoj kaj partoj de la mondo. Tial ni petas ĉiujn niajn amikojn, kiuj deziras akceli nian aferon — kaj tion ĉi ili faras, montrante per la gazeto ke la propagando agadas kaj sukcesas tie ĉi kaj tie —, ke ili ĉiam volu alsendi al ni tuj sciigojn pri kio ajn, kio en ilia regiono okazas rilate al nia komuna ideo kaj lingvo. Se loka gazeto presas noteton pri nia lingvo, se kurso estas aranĝata, se parolado estas farata k. t. p., oni volu en ĉiu aparta okazo pri tio sciigi la redaktoron, eĉ kvankam oni mem povas pensi, ke tiu kaj tiu ĉi speciala okazintaĵo ne estus de sufiĉa graveco por esti priparolata en la gazeto. La idealo por *Kroniko* estas, kompreneble, se ĝi povus enhavi ĉion, kio en la estanta tempo formas la historion de nia lingvo en la mondo.

Kiel ĝis nun, ni ankaŭ en la estonteco enpresos laŭ la eblo akiri ilin pli-malpli grandajn artikolojn pri la demandoj tuŝantaj la lingvon kaj ĝian vivon, kiuj aliras al si la estantan intereson de la esperantistaro.

Krom tiuj ĉi partoj ni ankaŭ konstante donos lokon al literaturaj verkaĵoj tiom, kiom permesos la spaco. Kaj por tiu ĉi parto

de la enhavo ni kun plezuro akceptas originalajn aŭ tradukitajn verkojn de kiu ajn verkinto Esperanta, nur kun tiu kondiĉo, ke la artikolo estu skribita en tute bona kaj korekta lingva formo kaj ke la enhavo estu interesa aŭ amuziga. Kompreneble ni volas eviti verkojn, kiuj enhavas ion nebonmoran, kio povus iel ofendi la delikatulojn inter nia legantaro; — tamen ni ne tro amas presi konstante, certe tre bonajn sed enuigajn, rakontojn dimanĉajn por infanoj. Se niaj kunlaborantoj ne scias certe, ĉu ia verko estas deca aŭ ne por nia gazeto, li nur legu ĝin en la nacia traduko antaŭ ĉiuj liaj familianoj, kaj li komprenos tuj ĝian konvenecon por la gazeto aŭ — por la papera korbo.

Certe ni enpresas *poezion*, sed ni akceptas nur absolute korektajn versojn; ĉar tiaj verkoj estas tro malfacile korekteblaj, se ili enhavas ian eraran formon. Antaŭ ĉio la poeziaj verkistoj devas bone posedi nian lingvon, por scii, kio estas efektive Esperanto kaj kio

ne. Se oni sendas al ni tre belegan kaj en aliaj rilatoj tre eminentan versaĵon, sed ĝi havas, ekzemple, la rimojn »ondo — profundo«, la versaĵo estas nehelveble rifuzata; ĉar ni ja ne povas uzi la fremdan vorton »profundo« anstataŭ la Esperanta »profundo«, ankaŭ ne povas ni rimigi »ondo — profundo«, — tio ĉi estus ja malbela.

Inter la diversajĵoj la amuziga parto estas konstante redaktata de la administranto, al kiu oni devas sendi la enportojn presotajn sub tiu rubriko.

En la informejo la abonantoj povas ricevi diversajn klarigojn, kiujn ili deziras de la redakcio, aŭ sciigi pri diversaj demandoj siajn kunabonantojn.

Pri abono oni volu sin turni, tute ne al la redaktoro kies tempo ne sufiĉas por tio, sed al la administranto.

Ne forgesu helpi nian gazeton varbante novajn abonantojn!

La Redakcio.



Ĉiun apartan el nia abonantaro ni petas pri tio ĉi:

Varbu *du* novajn abonantojn al nia gazeto — (vi mem ja certe reabonos).

Sendu la monon *nur* al s-ro *Paul de Lengyel*.

Sendu konstante nelongan sciigon pri ĉio eĉ negrava, kio okazas en via regiono en la intereso de nia afero, al la redaktoro s-ro *Paul Nylén* (kies ŝanĝitan adreson vi observu).

Se numero ia ne alvenas al vi ĝustatempe, sciigu pri tio s-ron *Paul de Lengyel*.

Al tiuj estimataj esperantistoj, kiuj havis la komplezon aboni pli ol unu ekzempleron de nia gazeto en la jaro 1900, ni sendis tiom samajn ekzemplerojn ankaŭ de tiu ĉi numero. Kiu eble nun ne dezirus reaboni denove tiom, li volu sciigi pri tio la administracion.

La administracio volonte sendas kelkajn ekzemplerojn de nia gazeto al tiuj, kiuj volas varbi novajn abonantojn.

Fine, ni petas niajn abonantojn ankoraŭ nepagintajn, ke ili volu havi la bonecon, ensendi al ni kiel eble plej baldaŭ la abonmonon.

La Administracio.



KRONIKO.



El Bohemujo-Moravujo. *

La **ĵurnalistaro ĉeĥa**. En la sociale demokrata ĵurnalo, eliranta en Prag, Bohemujo, estis la 23-an de oktobro 1900 presita artikolo pri Esperanto, skribita de s-ro J. Holub en *Loučka u n. Jičina*, Moravujo. S-ro Holub faris al ni la komplezon sendi al ni tradukon de tiu artikolo leginda, sed ĝi estas tro longa por la malgranda spaco de nia gazeto. Oni ricevas el tiu ĉi artikolo kaj el aliaj la impreson, ke la gazetoj ĉeĥaj volas serioze priparoli nian lingvon, konfesante ĝian utilcon. Rimarkinda estas la eldiro, kiun s-ro H. citas en la fino de sia artikolo el letero skribita al li de s-ro Karlo Pelant, kunredaktoro de l' sociale demokrata gazeto „*Rovnost*“, eldonata en Brno, Moravujo. Li skribis:

»La laboristaro, organizita internacie devas korespondadi dum strikoj, perlabormonaj movadoj k. t. p., kaj oni trovas malfacile en la servo de l' partio inteligentulon posedantan fremdajn lingvojn. Per Esperanto tiu demando gravega por la laboristaro estus solvita plej oportune; la laboristaj sekretariejoj, elpagejoj k. t. p. komunikigus inter si per tiu ĉi lingvo. Kaj espereble laboristoj vojaĝantaj en fremdaj landoj elkonos ĝian gravecon kaj lernos ĝin, por ke ili povu en translimaj organizacioj tute bone kunkompreniĝi.«

— S-ro Teodoro *Čejka* en Bistrice sciigis nin, ke »*Lotus*«, gazeto teozofia, eldonata en Prago, en bohema lingvo kaj organo de l' universala fratariĝo de l' homaro, skribis en la 1-a kajero de sia IV-a jaro (okt. 1900) pri Esperanto inter alia la sekvantan:

»Ni rekomendas al ĉiuj amikoj de l' reciproka frataro tiun ĉi lingvon, kiu estas neordinare facila kaj kiu jam ĉe ĉiuj nacioj estis fervore alprenita. Por internaciaj komunikoj tiu ĉi lingvo estas necesa bezono.«

* Ni devas rimarkigi al niaj legantoj, ke ni ne ĉiam sekvas en tiuj ĉi niaj rubrikoj la politikan interdividon de la ŝtatoj kaj regnoj, sed ofte atentis nur la nacilingvan unuecon. Tiu vidpunkto estas ja la plej grava por nia afero, ĉar ĉiu lingvo bezonas sian propran lernolibron k. t. p., kaj pro tio ĝi devas esti rigardata aparte.

— La bohema lernolibro, kiu nun estas publikigita, enhavas 12 presajn foliojn, ne 5 kiel ni erare diris en nia n-ro 9. Ni parolos pli detale pri ĝi en la venonta numero.

El Bulgarujo.

— Niaj bulgaraj amikoj estas tre diligentaj skribantoj pri Esperanto en la naciaj gazetoj. S-ro H. Popov sendis al ni kelkajn numerojn de Plovdivaj (= Filipo-plaj) gazetoj: »*Plovdivski Ek*«, n-ro 54 (17. XI. mn. st.) enhavas sufiĉe longan artikolon, verkitan de s-ro H. Popov, sub la rubriko: »La lingvo internacia Esperanto en Rusujo«; de la gazeto »*Novosti*« n-ro 16 (1. XII. mn. st.) havas artikoleon de s-ro G. Oreškof pri Esperanto kune kun anonco pri la lernolibro bulgara; n-ro 17 (8. XII.) donas artikoleon rubrikitan »Internacia bulgara-esperanta klubo en Plovdiv«; en n-ro 18 oni trovas presitan alvokon por fondi esperantan klubon en Plovdiv; la alvoko estas subsignita de s-roj advokato Il. S. Bobĉev, ĵurnalisto T. Kantardĵiev kaj oficisto de telegrafo G. Oreškof. En n-ro 19 de tiu sama gazeto oni legas la anoncon de n-ro 16 kaj artikolon de s-ro H. Popov, kiu komencas serion da artikoloj sub la rubriko »unu internacia lingvo.«

El Francujo.

La propagando de l' profesoro en la universitato de Dijon Ch. Méray. S-ro Méray faris al ni la plezuron sendi al ni apartan presajon de sia granda bonega artikolo en n-ro 4 (1900) de l' revuo „*L' Enseignement Mathématique*“. La artikolo, pri kiu ni jam parolis en n-ro 9 (1900), okupas 29 paĝojn kaj sendube akiros al nia lingvo multajn interesitajn amikojn inter la sciencularo.

— En n-ro 327 (29. XI. 1900) de l' dijona gazeto „*Le Bien Public*“ sin trovas unu-kaj-duon-kolona rakontodono de parolado pri *korespondado internacia en la lingvo Esperanto*, kiun faris s-ro Ch. Méray en salono de la Borso Komerca de Dijon pro la peto de s-roj Collot-Laurent, prezidanto de l' ĉambro komerca, kaj Aubry, direktoro de l' poŝtoj kaj telegrafoj de Côte-d'Or. En la aŭdantaro oni vidis instruistojn kaj lernantojn de plialtaj lernejoj, kelkajn sinjorinojn, profesorojn, oficirojn k. c.

Traktinte iom la devenon, esencon kaj disvastiĝon de Esperanto, la parolanto aliris

la ĉefan objekton de sia parolado. En tiu ĉi rilato li montris al la alestantoj kolekton da leteroj kaj poŝtaj kartoj, kiujn li estis ricevinta el ĉiuj partoj de l' mondo, kaj faris tradukojn de ilia enhavo.

Ĉiuj la korespondantoj — diras la gazeto — unuanime kaj senlace laŭdas la facilan lerneblecon, flekseblecon kaj belsonadon de la lingvo, la servojn, kiujn ĝi faris al ili por skribi ĉien, ricevi novaĵojn de ĉie, por kunlabori al fremdlingvaj revuoj, por vojaĝi, por ricevi vizitojn de fremduloj.

Ankaŭ estas rakontate pri la kunestado de s-roj J. Socha, Wagner kaj F. Avilov en Feldsberg en la jaro 1897, kiam tiuj tri sinjoroj parolis dum du tagoj nur Esperante, ĉar ili alian lingvon ne havis por sin komprenigi unu al la alia.

Similaj okazoj estas jam tro oftaj por esti notataj en la analoj de Esperanto — aldonas la franca ĵurnalisto. — Tamen li volas ankorau unu rakonti, ĉar ĝi okazis antaŭ nelonge en ilia urbo mem, en Dijono. S-ro Lambert, alestanta en la salono, efektive rakontis al la aŭdantaro, ke la 25-an de septembro lasta, dank' al la enskribo de sia nomo en la lasta jarlibro de la S. p. p. Esperanto, estis ricevinta la viziton, tre neatenditan, de svedo antaŭe al li nekonata, d-ro Krikortz el Stokholmo, travojaĝanta la banurbojn de Francujo; li retenis lin, ankaŭ en tagmanĝo, de la 2-a ĝis la 10-a horo de l' vespero, mendis al li hotelan ĉambron, akompanis lin en la sekvinta tago al la vagonaro forira: kaj dum tuta tiu tempo ili povis en Esperanto sola »babiladi kiel pigoj« pri ĉiuj ajn objektoj: medicino, instruado, akvoj mineralaj, pri Svedujo, ĝia neĝo, ĝiaj laplandanoj, fotografo, velocipeda sporto, politiko, la afero Dreyfus, malgrandaĵoj okazantaj dum manĝo, la speciala mekanismo de la biciklo de l' svedo k. t. p.

La parolado de s-ro Méray estas priskribita kiel treege interesiga kaj talenta; ĝi daŭris du horojn tute senlacige por la aŭdantoj, ĉe kiuj ĝi lasis tre profundan impreson.

Unuanimaj aplaŭdoj postsekvis la vortojn de l' ŝatata parolinto.

El Germanujo.

— »Ili transiras la riveron por trovi la akvon!«
S-ro Waclaw Woyde faris al ni la komplezon transsendi

al ni la n-ro 263 de »Hamburger Echo« (10. XI. 1900), en kiu sin trovas kurioza sciigo: Du tre instruitaj doktoroj en Berlino entreprenis instrui la latinan lingvon al publiko da laboristoj kaj aliaj »malgrandaĵaj« homoj. »Cui bonum?« demandis ĉiam unue la juĝistoj en antikva Romo, kaj ankaŭ ni demandas: kiu do havos utilon de tio? Sendube la instruitaj doktoroj havis tro malmulte da laboro kaj enuigis je la senlaboreco. Certe ili ankaŭ ne eksciis pri la ekzisto de Esperanto.

El Hungarujo.

— En la n-ro 43 de l' gazeto »Tolnamgyei Közlöny«, eldonata en Szegzárd, oni legas pri tio, kion ni sciigis en nia n-ro 8, la sekvantan artikoleon:

»Nia gazeto en la universitato Upsala. D-ro K. B. Wiklund, docento ĉe la universitato Upsala (Svedujo) kaj instruanto de la lingvoj apartenantaj al la finn-ugora lingvaro, adreŝis leteron per helpo de la lingvo Esperanto al la szegzárda presisto Paul de Lengyel, eldonanto de la monata Esperanta gazeto »Lingvo Internacia«, ke tiu ĉi sendu al li 4 ekz. da Mikszáth'a Almanako kaj 5 ekz. da n-ro 37 de nia gazeto (en kiu estis presita la hungara traduko de l' rakonto »Elefantido« el la suprenomita Esp. gazeto), por ke li ilin uzadu ĉe liaj instruoj pri la lingvo hungara en la universitato. Kiam ni donas esprimon al nia ĝojo je tiu okazo, ke ni povis iom helpi laŭ nia malgranda forto la eminentan scienculon pri la konatigo de nia dolĉa patrolingvo en la malproksima nordo, ni ne povas rifuzi al ni almontri al tiu cirkonstanco, ke la lingvo Esperanto, — kiu en nia patrujo bataladas kun multo da antaŭjuĝoj, sed kiu en la eksterlandaro ĉiam pli disvastiĝadas, — jen estas uzata ankaŭ en la praktika vivo.«

El Japanujo.

Unu el niaj amikoj en Orienta Azio, s-ro S. Poljanskij, skribis al ni, antaŭ kelke da tempo, leteron pri la ebloj konigi nian lingvon en Japanujo. El ĝi ni citas la sekvantan:

En Japanujo estas eldonata ĉiumonata ĵurnalo »The Orient (The Hansei Zasshi Transformed)« * en la lingvoj: angla (pleje), germana kaj franca. **

* Ĝia adreso:

Office of »The Orient«
N^o 10, Nishikata-machi, Hongò,
Tòkyò, Japan.

** La ĵurnalo anoncas: »Contribution or correspondence may be in English, German or French«, sed en n-roj 1—3 de la 1900 j. la franca lingvo mankas. Ĝis la 1895 j. estis artikoloj ankaŭ en la lingvo rusa.

La ĵurnalo celas konigi alilandanojn kun Japanujo ĉiufanke: en etnografia, religia, politika, industria, historia k. c. rilatoj, sed havas ŝajne ankaŭ reciprokan celon, ĉar presas ekzemple la artikolon »Die Lehre von der Person Christi« de d-ro T. Okasaki (n-ro 2 de la 1900 j.).

La Esperanta faro en Japanujo nun estas tre malforta, tie apenaŭ estas unu korespondanto, la Societo *Kihin-kwai* aŭ *Welcome Society* en Tokio (vidu L. I. n-ro 4/28 de la 1898 j.), kiu komprenas esperantajn leterojn kaj respondas je ili (sed angle). Tial estus tre dezirinde se oni altirus la atenton de »The Orient« al Esperanto.

Oni devas rimarki, ke Esperanto en Japanujo renkontos fortan kontraŭulon en la lingvo angla, kiu en Japanujo estas opiniata kiel vera natura lingvo internacia.

El Rusujo.

Projektita nova esperantista gazeto. La Societo »Espero« anoncis sian decidon komenci la eldonadon de propra organo en rusa kaj Esperanta lingvoj. Ni ne scias ankoraŭ, ĉu la Societo efektivigos tiun projekton.

Estas malfacile por ni eldiri ian propran opinion pri tia entrepreno, ĉar unuparte ni ne konas, kiamaniere rilatas al ĝi la rusaj esperantistoj kaj aliparte niaj propraj ĵurnalistaj spertoj ampleksas nur landon, kie la registaro demandas kiel eble plej malmulte pri la ekzistado aŭ enhavo de gazeto esperantista.

Ni esperas, ke la afero estos aranĝita en la maniero plej oportuna por ĉiuj.

— S-ro K. Ostanjeviĉ, la prezidanto de l' Societo »Espero«, sendis al ni rusan broŝureton, kiun li publikigis kaj kiu estas traduko de la humoresko »La baleno« enpresita en »L. I.« antaŭ tri-kvar jaroj.

El la periferio de l' rondo. Eltiro el la letero de s-ro F. Postnikov, kiun li skribis al ni el Vladivostok datitan la 1. I. 1901:

»El leteroj de multaj esperantistoj mi vidas, ke ili eksciinte, ke dum la ĥinuja militado estis mortigita oficiro Postnikov, timas ke tiu ĉi mi estas. (Tion ĉi skribis ne sole rusaj esperantistoj, sed ankaŭ svedaj, finnaj kaj unu franca.)

Povas esti, ke sekve de tiu ĉi kaŭzo mi ne ricevis respondon de kelkaj miaj leteroj.

Mi estas vivanta, kvankam — efektive — unu el la plej energiaj membroj de nia familio: mia kara frato (la plej maljuna) *Petro Postnikov*, kolonelo de artilerio,

estis mortigita apud la ĥina fortejo Ĥun-ĉun, kaj nur lian senvivan korpon alveturigis hejmen mia sepdekjara patro, kiu nur antaŭ kelkaj monatoj alveturis en tiun ĉi landon por viziti sian familion.«

El Svedujo.

La Klubo Esperantista en Upsala kunvenis la 6-an de novembro lasta. La klubo havis tiam la plezuron saluti la bonvenon al filoz. magistro *Rolf Nordenstreng*, la finlanda samideano demalnove konata kaj estimata en la esperantistaro, kiu sin trovas nun en Upsala pro lingvaj studiadoj universitataj.

Prezidanton de la klubo post la deiro de s-ro Valdemar *Langlet*, kiu post okjara prezidanteco petis nreelekton, ĉar li jam ne loĝas en Upsala, oni elektis unuvoĉe s-ron *Paul Nylén*. Por esprimi sian simpatian kaj dankon al s-ro Langlet, oni elektis lin honora membro de la klubo.

Estis kreita komitato da tri personoj kun la komisiono ellabori projekton de nova regularo por la klubo anstataŭ la ĝisnuna regularo, kiu montris sin tro primitiva rilate al la disvolviĝo kaj nuna agado de la klubo. Revisoroj por travidi la administradon de l' anstataŭa kasisto estis elektitaj.

La demando pri fondado de Nord-Eŭropa Esperanta Societo estis preparolata, kaj la klubo esprimis denove la dezirindecon de tia societo.

La gazeto *Upsala Nya Tidning* n-ro 1613 (7. XI. 1900) havis artikoleon pri la kunveno.

La Klubo Esperantista Stokholma. Pro diversaj kaŭzoj (speciale pro tio ke la prezidanto dr. *Etzel* dum longa tempo estis en vojaĝoj en Hispanujo, Anglujo k. t. p.) la klubo de kelke da monatoj ne estis kunvokita al komuna kunsido. Tio estas tre maloportuna por la propagando, ĉar la kunsidoj estas ĉiam notataj en la gazetoj, kiuj dank' al ili havas memdonan okazon paroli pri Esperanto. Tiaj signoj de vivo efikas ĉiam tre bone en la publiko, kiu ne tro ofte povas esti rememorigata pri nia afero.

La Klubo Stokholma tamen havas aliajn manierojn por montri sian vivemecon; unu tia maniero estas la merkredaj kunvenoj. Ili estas tute liberaj, neniu estas vokata en ilin, ĉiu

venas memvole, sciante, ke en la merkredaj vesperoj inter la horoj 8.30—11 oni povas renkonti almenaŭ iun esperantiston en la kafejo de n-ro 18 Regeringsgatan en la centro de Stockholm. Plej ofte alvenas 5—10 personoj — sinjoroj kaj sinjorinoj — por trinki tason da teo aŭ sim. kaj interparoli Esperante kun siaj samideanoj. Tiuj vesperoj estas ĉiam pli kaj pli vizitataj. Ĉar la klubanoj ne disponas la ĉambron, kie ili kutimas kolektiĝi, per alia rajto ol per sia alestado, ankaŭ aliaj gastoj, neesperantistoj, ofte venas okupi tablon en la sama ĉambro. Tiam estas tre interese rimarki, kiel ili miras, kian lingvon parolas tiuj ĉi »fremduloj« multnombraj. Kaj la »fremduloj« penas malfaciligi la divenon, ne nomante la nomon »Esperanto« nek alimaniere liverante al la scivoluloj ian solvilon de l' enigmo, sed nur habilas gaje pri ĉio ajn.

En urbo Södertelje disvolviĝis tre viva agado por la Esperanta propagando.

La kurso de s-ro J. J. Süssmuth ne sole havis multe da partoprenantoj, sed ankaŭ alie donis bonegan rezultaton. Post la fino de l' kurso oni aranĝis kunvenon, kiu havis lokon la 28-an de novembro lasta. Pri tio ĉi gazeto „Södertelje Tidning“ (n-ro 1053, 30. XI. 1900) enhavas sufiĉe longan artikolon, parte en sveda lingvo, parte en Esperanto. El ĝi ni citas la sekvantan: »Ĉu oni prosperis veki ian pli vastan intereson por la ellernado de la lingvo Esperanto, tion ni ne scias. Sed almenaŭ nia kunredaktoro tiel interesiĝis, ke reveninte hejmen li tuj komencis ellerni la lernolibron. La unuan frukton de siaj studioj li vidigis en la sekvanta artikolo en Esperanto:

Vespero Esperanta. Antaŭhierau ni ricevis inviton alesti Vesperon Esperantan en la halo de la Sobremegistoj kiuj sin nomas »Goodtemplars«. La Esperantistoj de nia urbo aranĝis la kunvenon por interesiĝi la publikon por la lingvo internacia. Oni estis parolonta, kantonta, deklamonta, kaj svede kaj esperante, ankaŭ muzikonta. Venis tre multaj aŭskultantoj. La vitristo sinjoro Alberto Nyberg salutis nin kaj deziris al ni esti bonvenintaj. Li diris ke kandidato Paul Nylén, la redaktoro de la gazeto Lingvo Internacia, promesinta eble veni por paroladi, ne venis. Laboranto de nia urbo, sinjoro

Norlén bone lin anstataŭis. Ankaŭ sinjoro Süssmuth paroladis. La filo de l' vitristo Nyberg kantis esperante kaj fraŭlino ludis je piano. Dum la paŭzo, eble tro longa, la alestantoj kafon prenis kaj havis okazon enskribiĝi esperantistoj. Post la paŭzo la juna sinjoro Nyberg kantis amuzan kanteton pri la akvokonduko de nia urbo. Estis tuta la vespero tre agrabla.

Se en tio estas eraroj tro multaj, ni esperas ke la esperantistoj pli maljunaj pardonos al ni. Skribis ni tion, leginte *duhore* la lernolibron kaj la vortarojn de sinjoro P. Nylén.«

(La gramatikaj eraroj de l' originalo estas tre malmultaj kaj malgravaj: la *n* de l' akuzativo estas forgesita en du lokoj kaj erare aldonita en unu alia. Iom da ortografiaj aŭ presaj eraroj ni ne kalkulas.)

Ankaŭ alia södertelja gazeto „Gripen“ (n-ro 141, 30. XI. 1900) havis artikoleon simpatian pri la kunveno.

— En „Södertelje Tidning“ oni legis, la 28-an de decembro malgrandan noticon, ke komuna kunveno por fondo de klubo esperantista havos lokon en la vespero de la unua tago de l' nova jaro.

—**—

El Esperantujo.

Esperanto per la poŝto. Ekzistas en la nuna tempo tre multaj specoj da kovertoj kaj poŝtkartoj, kiuj portas anoncojn aŭ sciigojn pri Esperanto. Tiuj, kiujn ni nun rememoras, estas la sekvantaj: 1. la kovertoj francaj de la S. p. p. Esp.; 2. la kovertoj svedlingvaj, kiujn presigis s-ro Aug. Th. Laurén en Jyväskylä, Finnlando; 3. la kovertoj svedlingvaj de s-ro J. J. Süssmuth en Södertelje; 4. la svedaj kovertoj de s-ro Ellert Johnson en Jerna; 5. la germanaj kovertoj de d-ro Ad. Ebner (li tamen ne presis sian adreson sur la kovertoj, kio malhelpas al interesitaj personoj ricevi de li la informojn pri Esperanto, kiujn li promesas); 6. la bulgaraj poŝtkartoj kun la portreto de d-ro Zamenhof; 7. la belaj poŝtkartoj bohemiŝlingvaj de s-ro T. Čejka en Bystřice, Moravujo; 8. la propagandaj kovertoj de l' Societo »Espero« en S. Peterburgo k. t. p.



VOJAĜO DE DIABLO.

— De Murger. —

Sur la vojo, kiu servis por eniri en la vilaĝon, vojaĝanto marŝis, tute sola. Lia vizaĝo estis abomena; lia kapo kvazaŭ estus disigita de la trunko de lia korpo.

Sub liaj densaj, vilaj brovoj kiel du flamoj brilis liaj okuloj. Liaj haroj tiel pendis suben, kiel en fandejo la fajrigitaj ŝtalarubandoj. De sur lia frunto fluis ŝvitaĵo, per kies gutoj la tero kaŭteriziĝis.

Terurega rideto ludis sur liaj lipoj. Skuiĝis la tero sub liaj paŝoj. En la ĉirkaŭaĵo de tiu loko, sur kiu li marŝis, la birdoj ĉesis pepadi kaj ili time kaŝis sub laflugiloj siajn idojn. La arboj tremante kliniĝis, kvazaŭ blovus granda ventego. La floroj, sur kiuj roso brilis, retenis siajn odorojn. La herboj, sur kiuj ĵetiĝis lia ombro, fariĝis ruĝaj, kvazaŭ fajra karbo falus sur ilin.

Kaj kiam li preterpasis ĉe fonto, entrempante en ĝin sian bastonon: la akvo komencis tuj fermenti kaj nigra fumo leviĝis el ĝi. La saltantaj ondoj haltis kaj la pura akvo marĉiĝis.

La vojaĝanto, dum lia marŝado, kantis ian nekonatan, strangesonan melodion, kiu

timigus ankaŭ la plej kuraĝan homon, — ĝi eĉ timigis la eĥon mem, kiu ue kuraĝis ĝin redoni.

La vespera sonorilo mutiĝis en la turo, kaj la sonorigisto pro la ĉagreno komencis diinsulti. Kaj, ĉar li ofendis Dion en sia propra domo, li estis juĝata je infero eternflama.

Kiam la vojaĝanto preterpasis apud la preĝejo, la sanktoj pentritaj sur la fenestrovitroj teruriĝis, — kaj la pastro, genufleksanta antaŭ la altaro, forgesis la preĝon.

La preĝejservanto entrinkis la vinon dediĉatan por la sankta mesofero kaj la altarservanta knabo ŝtelis la monkesteton el la preĝejo. La servantino de l' pastro malfermis pordon por veninto, kiu havis kvin piedojn.

Kiam la vojaĝanto jam forlasis la vilaĝon, li haltis ĉe la pordego kaj aŭdigis abomenan ridegon, kiu ĵaluzigis la noktajn strigojn. Li murmuris:

— Mia maŝtro estos certe kontenta je mia agado!

Ĉar li estis sendito de diablo, — lia ofico estis semi krimon.

Tradukis el la lingvo hungara

Paul de Lengyel.



PENSOJ EL LA LULSEĜO.

— En la literaturo de l' amo la manpremo estas antaŭparolo. Kaj la kiso: enkonduko.

— Edzeco sen amo estas: kiel manĝaĵo sen salo.

— Bona homo konvinkiĝas plej rapide pri tio, ke la plejmulto da homoj estas malbona.

— En la antikvaj tempoj Amor' kunigis la parojn. Nuntempe la doto ludas tiun ĉi rolon.

— Plej potenca sinjoro estas la amo, ĉar ĝi havas la plej multajn sklavojn.


— Oni povas pli rapide esplori la sekretojn de l' universo, ol la sekretojn de l' virina koro.

— Fajro estas la amo, kiun oni estingas per kiso.

— La edzeco estas la plej terura mortigisto: ĝi mortigas la plej multan amon.

— Cerbo kaj koro estas en eterna interbatalado. Kaj, domaĝe, preskaŭ ĉiam la koro venkas.

— La ekседziĝa proceso estas monumento de l' finiĝinta amo.



La malbeno de kantisto.

(El L. Uhland.)

*En l' antikveco staris kastel' kun fort-murar',
Reginta en la lando ĝis la blueta mar';
Girland' da bonodoraj ĝardenoj zonis ĝin,
Kaj tie ĉielarke fontanoj levis sin.*

*En la kastelo vivis fiera riĉa reĝ',
Li sidis nuba, pala sur sia trona seĝ',
Ĉar en meditoj liaj nur estis nigra mort',
En la rigardo — vipo, kaj sang' — en lia vort'.*

*Kaj tien du kantistoj alvenis, nobla par',
La unu or-buklita, la dua kun griz-har';
La maljunulo rajdis kun harpo en la man',
Sekvata de l' junulo, floranta bel-infan'.*

*Kaj la junulo diris: „Jen venas nun la hor',
La plej profundajn kantojn reveku en la kor',
Bel-kantojn kun gajega kaj kun dolora ton',
Por tuŝi tiun reĝon, kruelan pli ol ŝton'.”*

*Kaj jen stariĝis ambaŭ antaŭ la reĝa seĝ',
Apude la reĝino kaj la nubega reĝ', —
La reĝo brilas kiel sangruĝa lum' de sun',
Kaj la reĝin' similas al dolĉa-paca lun'.*

*Jen la grizulo tuŝas la kordojn, — la salon'
Ektremas sub la dia, sub la mirinda son';
La voĉo de l' junulo, ĝi fluas kun sonor',
La griza akompanas lin kiel plora ĥor'.*

*Kaj ili laute kantas pri amo kaj printemp',
Pri liberec', kuraĝo, pri l' ora bona temp', —
Pri ĉio, tremiganta la fibrojn de homkor',
Pri ĉio, altiganta la amon al honor'.*

*La korteguloj staras sen mok', sen ironi',
La militistoj pie kliniĝas antaŭ Di'.
Kaj la reĝin', tuŝita de l' die-dolĉa ĥor',
Al la kantistoj rozon aljetas kun favor'.*

„Vi tentis miajn virojn!“ la reĝ', ekkrias li:
 Kaj volas ankaŭ logi l' edzinon nun de mi?“
 Li ĵetas sian glavon, — de l' brust' de l' bel-infan'
 Anstataŭ oraj kantoj elŝprucas sangfontan'.

La aro, ĝi timeme forkuras de l' reĝul',
 Kaj mortas en la brakoj de l' majstro la junul',
 La majstro lin elportas, lin kovras per mantel',
 Kaj, lin surĉevalinte, rapidas de l' kastel'.

Li ĉe l' pordeg' stariĝas sen vorto kaj sen son',
 Stariĝas kun la harpo, de ĉiuj harpoj kron',
 Li ĝin pecigas kontraŭ la ŝtonoj de la mur',
 Kaj sonas kri' terura tra l' kort' kaj tra la tur'.


„Ve! ve al vi sangama, fiera bril-salon'!
 Neniam vin dolĉigu kantad' aŭ korda son'!
 En vi nur ĝemo estu kaj pala tim' de sklav',
 Ĝis vin faligos polven venĝema sanga glav'!

„Ve al vi, bel-ĝardeno en l' odorant-aer',
 Rigardu la palecon de tiu ĉi ofer',
 Rigardu ĝis velkiĝi, kaj mortu via font'
 Kaj kuŝu je eterne sub rubo kaj sub hont'.

„Ve al vi, mortigisto, malben' al via voj',
 Al via glorcelado kaj al serĉad' de ĝoj',
 En nokt', eterna nokto droniĝu via nom',
 Ĝi malaperu kiel ekspiro de fantom'!“

La maljunulo diris, lin aŭdis la ĉiel',
 Kaj falis la muregoj, kaj falis la kastel',
 De la belec' antaŭa nun restas en la val'
 Nur unu alt-kolono, tut-preta al ekfal'.

Anstataŭ la ĝardenoj, dezert' etendas sin,
 Sen fontoj, sen ombraĵoj, nur rubo kaj ruĝin':
 La reĝa nom' ne sonas: forges', ekstermo, mort' —
 Jen de l' kantisto estis la malbenanta vort'.



Tradukis

G. Schroeder kaj A. Kofman.

VILHELMO MONA.

Antaŭ kelkaj jaroj vivadis en vilaĝo Fuli* malriĉa vilaĝano nomata Vilhelmo Mona.

Ĉiunokte urso venadis por ŝteli liajn pirojn, ĉar al tiaj bestoj ĉio estas bona. Tiu ĉi sin alturnis prefere al pirujo ŝargata de krasanoj**. Ĉu iu ekpensus ke tia besto havas la homajn gustojn, kaj ke en ĝardeno ĝi precize elektas la pirojn degelantajn en la buŝo?

Sed bedaŭrinde la fulia vilaĝano ankaŭ pliamis la krasanajn pirojn, ol ĉiujn aliajn fruktojn. Antaŭe li kredis ke estas infanoj kiuj venas difekti lian fruktarbaretojn; sekve li prenis sian pafilon. Kaj ĝin ŝarginte per dika salo kuireja, sin lokis je embusko.

Ĉirkaŭ la dekunua horo, kriego sonegis tra la monto. »Nu, — li diris, — jen estas urso en la ĉirkaŭaĵoj.« — Post dek minutoj, aŭdiĝis dua kriego, sed tiel potenca, tiel proksima, ke Vilhelmo, pripensinte ke li ne havas la tempon por reiri domon, sin ĵetis teren per la ventro, nur esperante ke l' urso alvenas al liaj piroj, ne al li mem.

Efektive, tuj preskaŭ, ĉe la fruktarbareta angulo aperis la besto, kiu, al la supredirita pirujo irante laŭ rekta linio, pasis je dek paŝoj de Vilhelmo, rapidmove supreniris sur la arbo, kies branĉojn krakadigis per la pezo de sia korpo, kaj tie ekenglutis tiom da piroj, ke, videble, du tiaj vizitoj faros la trian senutila. Kiam la urso fariĝis sata, ĝi malsupreniris malrapide, kvazaŭ ĝi bedaŭras lasi kelke da fruktoj: ĝi ree pasis proksime de nia ĉasanto, al kiu, en tiu ĉi okazo, la pafilo de l' salo ŝargita ne povis esti tre utila, kaj kviete ĝi foriris en la monton. Ĉio tio ĉi daŭris ĉirkaŭ unu horon, dum kiu, la tempo ŝajnis al la viro pli longa, ol al la urso.

* Fuli, vilaĝeto en la Francaj Alpoj.

** Krasanoj, speco da piro.

La viro tamen estis bravulo... kaj li estis mallaŭte dirinta, vidante la urson forirantan: »Tio estas bona, foriru, sed tio ne finiĝos tiel, ni iam revidos unu la alian.«

La morgaŭan tagon, unu el liaj najbaroj, alveninte por lin viziti, trovis lin okupatan fragmente segadi dentojn de forko.

— Kion do vi faras tiel? — diris li.

— Mi amuziĝas, — respondis Vilhelmo.

La najbaro ekkaptis la ferajn pecojn, ilin turnis kaj returnis en sia mano, kiel viro kiu tion konas: »Nu! Vilhelmo, — diris li, — se vi volos sincere paroli, vi konfesos ke tiuj ĉi feraj fragmentoj estas kredeble trapikontaj pli krudan haŭton ol tiu de ĉamo.

— Eble, — respondis Vilhelmo.

— Vi scias ke mi estas bonulo, — aldiris Franzo (tia estis la nomo de la najbaro), nu! al ni ambaŭ estu la urso; ĉu vi tion konsentas? Du viroj pli povas ol unu.

— Tio dependas de la okazo, — diris Vilhelmo, kaj eksegadis sian trian fragmenton.

— Al vi tamen sola, — daŭrigis Franzo, — mi allasos la felon, ni interdividos nur la rekompencmonon* kaj la viandon.

— Mi preferas la ĉion, — diris Vilhelmo.

— Sed ja vi ne malhelpos min serĉadi tra la monto la postsignon de l' urso, kaj, se mi ĝin estus trovinta, min loki je embusko apud ĝia pasejo.

— Vi estas pri tio ĉi libera.

Tiam do Vilhelmo, jam seginte siajn tri fragmentojn, ekmezuris, fajfante, pulvan ŝargajon duoblan ol tiu kiun kutime oni enmetas en pafilon.

— Vi, ŝajne, prenos vian militpafilon, — diris Franzo.

* France, la *prime*: tio estas la mono promesita al tiu, kiu urson mortigas.

— Jes, kredeble! tri feraj pecoj pli bone sukcesos ol unu plumba kuglo.

— Tio difektas la felon.

— Tio pli krude mortigas.

— Kiam do vi intencas ekĉasi?

— Tion mi diros al vi morgaŭ.

— Lastafoje, ĉu vi konsentas?

— Ne.

— Mi avertas vin ke mi estas baldaŭ la postsignon serĉonta.

— Multe da plezuro!

— Estu la urso al ni ambaŭ, mi vin petas.

— Ĉiu por si.

— Adiaŭ, Vilhelmo!

— Bonan sukceson, najbaro!

Kaj forirante la najbaro vidis Vilhelmon enmetantan la duoblan pulvan ŝargaĵon en lian militpafilon, kaj poste lokantan la batalilon en angulo de lia laborejo. Vespere, kiam li ree pasis antaŭ la dometo, li ekvidis Vilhelmon sidantan sur la benko, kiu kuŝis apud la pordo, kaj tie kviete fumantan la pipon. Al li denove li aliris.

— Nu, — li diris, — mi ne estas venĝema. Mi eltrovis la postsignon de nia besto; tial mi jam ne bezonas vin. Mi tamen venas por proponi al vi ke ni ambaŭ kune agadi.

— Ĉiu por si, — diris Vilhelmo.

La najbaro poste povis nenion rakonti el tio kion Vilhelmo faradis la vesperon.

Je la duono de la dekunua horo, la edzino de Vilhelmo vidis lin kapti lian pafilon, volvi sub lia brako griztolan sakon, kaj poste foriri. Ĝi ne kuraĝis lin demandi kien li iras, ĉar Vilhelmo ne estis ema doni klarigojn al virino.

Franzo, siaflanke, estis efektive trovinta la postsignon de l'urso; li ĝin estis sekvinta ĝis la loko kie ĝi penetras en la fruktarbaretton de Vilhelmo; kaj, tial ke li ne havas la rajton por ĉasi sur la bienoj de sia najbaro, sin lokis inter la ĝardeno de Vilhelmo kaj la abia arbaro kuŝanta je la mezflanko de la monto.

Ĉar la nokto estas sufiĉe luma, li vidis Vilhelmon forirantan per lia posta pordo. Vil-

helmo iris ĝis la malsupro de grizeta ŝtonego, kiu, ruliĝinte el la monto ĝis la mezo de la fruktarbareto, troviĝis apenaŭ je dudek paŝoj de la pirujo; tie ĉi li haltis, ĉirkaŭ si ekrigardis ĉu lin iu observus, malvolvis sian sakon, eniris en ĝin, lasante nur eksteraperi tra la malfermo sian kapon kaj siajn ambaŭ brakojn, kaj apogante sin kontraŭ la ŝtonego, baldaŭ unuiĝis tiel absolute je la ŝtono pro la koloro de l'sako kaj sia propra senmovado, ke la najbaro, kiu tamen sciis ke li tie estas, eĉ ne povis lin distingi. Kvaronon da horo tiel li pasigis, atendante la urson. Fine, ĝin anoncis daŭrigata kriego. Post kvin minutoj Franzo ĝin ekvidis.

Sed, ĉu ruze, ĉu ekflarinte la duan ĉasanton, ĝi ne eniris sian kutiman vojon: kontraŭe, ĝi estis farinta ĉirkaŭon, kaj anstataŭ alveni maldekstre de Vilhelmo, kiel antaŭan tagon, ĝi pasis dekstre, ekster la atingo de la batalilo de Franzo, sed apenaŭ je dek paŝoj de l'ekstrema fino de l'pafilo de Vilhelmo.

Vilhelmo ne moviĝis. Estis kredeble ke li ne eĉ vidis la sovaĝan beston kiun por observi li estis veninta, kaj kiu, tiel proksime pasante, ŝajnis lin elvoki. La urso, kies flarado trompiĝis, ŝajnis siaflanke nescii la apudeston de malamiko, kaj rapidmove ĝi daŭrigis sian marŝadon al la arbo. Sed je la momento kiam, stariĝante sur siaj postaj piedoj, ĝi la trunkon ĉirkaŭprenis per siaj antaŭaj piedoj, prezentante sian kontraŭan bruston, kiun ne defendas plu ĝiaj densaj ŝultroj, subite brilis rapida luma strio kontraŭ la ŝtonego, kaj la tuta valo sonegis per la pafado de la duoble ŝargita pafilo, kaj per la kriego de la besto morte vundita.

En la tuta vilaĝo neniu eble estis kiu ne aŭdis la pafon de Vilhelmo kaj la kriegon de l'urso.

La urso forkuris repasante je dek paŝoj de Vilhelmo, kiun ĝi ne ekvidis, tial ke li denove, siajn brakojn kaj kapon reenmetinte en la sakon, unuiĝis je la ŝtonego. Tiun ĉi scenon rigardis la najbaro apogata je siaj genuoj kaj maldekstra mano, dum per la dekstra

li prenis sian karabenon, pala kaj la spiron retenanta. Li estas ja kruda ĉasisto! Nu, li tamen konfesis al mi, ke je tiu ĉi momento li estis dezirinta kuŝi en sia lito anstataŭ stari je embusko.

Tio estis ankoraŭ multe pli malbona, kiam li vidis la vunditan urson, kiu, longan ĉirkaŭon farinte, provis trovi sian hieraŭan irejon, kiu rekte kondukis al li. Krucosignon li tiam faris, (ĉar estas piemaj niaj ĉasistoj,) li rekomendis sian animon al Dio, kaj sin certigis ke lia karabeno estas preta por pafi.

Nur je kvindek paŝoj de li estis la urso krieganta pro doloro, haltanta por sin tere ruli kaj mordadi sian vunditan flankon, poste sian kuradon ree komencanta.

Ĝi ĉiam alproksimiĝis; ĝi nur estis je tridek paŝoj. Du sekundoj ankoraŭ, kaj ĝi estis tuŝonta la tubon de l' karabeno de la najbaro, kiam subite ĝi haltis, alspiris bruege la venton, kiu ekblovis de la vilaĝo, terure kriegis kaj reeniris en la fruktarbareton.

— Atentiĝu al vi, Vilhelmo! atentiĝu! — ekkriis Franzo ekkurante post la urso, kaj ĉion forgesante por nur pensadi je sia amiko, ĉar li ja sentis ke se Vilhelmo ne estus havinta la tempon por reŝargi sian pafilon, li pereus: ĉar lin estis elfaradinta la urso. Li ne estis farinta dek paŝojn, kiam li aŭdis krimon. Tiu ĉi krio estis homa krio, terura kaj ankaŭ morta krio; krio por kiu la krianto estis kuniginta ĉiujn fortojn de sia brusto, ĉiujn siajn preĝojn al Dio, ĉiujn siajn helpalvokojn al la homoj: »Al mi!« Post tiu ĉi krio de Vilhelmo aŭdiĝis nenio, ne eĉ unu plendo.

Franzo ne kuradis, li flugadis; la dekliva loko rapidigis lian kuradon. Ju pli li alproksimiĝis, des pli klare li distingis la dikegan beston kiu moviĝis en la ombro, premante per siaj piedoj la korpon de Vilhelmo, kiun ĝi fragmente disŝiradis.

Franzo estis je kvar paŝoj de ili, kaj tamen la urso estis tiel kruele okupata je sia mortigato, ke, ŝajne, ĝi ne estis lin ekvidinta. Li ne kuraĝis pafi, el timo ke li mortigu Vilhelmon eble ne ankoraŭ mortintan; ĉar li tiel tremadis ke ne estas plu sufiĉe certa por pafi. Li do ekkaptis ŝtoneron, kiun li ĵetis al la besto.

Furioza la besto sin alturnis al sia nova malamiko; ili estis ambaŭ tiel proksimaj unu de la alia, ke la urso starigis per siaj postaj piedoj por lin sufoki. Franzo sentis ke ĝi ŝtopas per sia brusto l' ekstreman tubon de lia karabeno. Maŝine li premis per sia fingro la malstreĉilon (riglileton) kaj pafis.

La urso falis dorse: estis al li la kuglo traborinta la bruston kaj rompinta la vertebran spinon.

Franzo lasis ĝin kriegantan rampi per antaŭaj piedoj, kaj li alkuris al Vilhelmo. Jen tio ne estis plu homo, eĉ tio ne estis plu mortinta homo, — estis nur ostoj, kontuzita viando; la kapo estis preskaŭ tute englutita.

Tiam, ĉar li rimarkis, laŭ la movado de lumajoj, kiuj pasis post la fenestrovitroj, ke kelkaj el la loĝantoj de la vilaĝo estas vekitaj, li alvokis multfoje, anoncante kie li estas.

Kelkaj vilaĝanoj alkuris kun bataliloj, ĉar ili estis aŭdintaj la kriojn kaj la pafojn. Baldaŭ tuta la vilaĝanaro kunveninta staris en la fruktoĝardeno de Vilhelmo.

La Vilhelmedzino alvenis kun la aliaj. Tio estis malĝojega sceno. Ĉiuj apudestantoj ploris kiel infanoj.

Por la vidvino fariĝis en la tuta valo de Rhodano* monkolokto, kiu sepcent frankojn produktis. Al ŝi cedis Franzo la rekompencmonon, al ŝia profito ankaŭ li vendis la felon kaj la viandon de l' urso. Per unu vorto, — ĉiu klopodis por ŝin helpi kaj subteni.

Tradukis el Aleksandro Dumas

F. Lallemand, vic-prezidanto de l' Esperantista Grupo Dijona.

* *Rhodano*: riverego de Francujo.

ORDENO.

(De A. Ĉĥov.)

La instruisto de progimnazio, Leo Pustjakov, en la mateno de nova jaro venis al sia amiko, leŭtenanto Ledeneov.

— Jen la afero, — diris li post la kutima gratulo por nova jaro, — mi ne maltrankviligus vin sen la ekstrema bezono: donu al mi por hodiaŭa tago vian ordenon de Sankta Stanislavo. Hodiaŭ mi tagmanĝas ĉe la komercisto Spiĉkin. Sed vi scias tiun ĉi homon: li amas supermezure ordenojn kaj rigardas kun malestimo tiujn, kiuj ne havas ian ordenon sur la kolo aŭ en la butontruo. Krom tio li havas du filinojn. Donu, mi petas.

La leŭtenanto murmuris, sed donis la ordenon.

Je du horoj Pustjakov veturis en fiakro kaj malkovrinte iom la pelton, rigardis sian bruston, sur kiu brilis per oro kaj emajlo la malpropra ordeno.

— Oni sentas al si pli da estimo, — pensis la instruisto, — malgranda objekto, sed kian impreson ĝi faras!

Kiam li atingis la domon de Spiĉkin, li diskovris la pelton kaj komencis malrapide elpreni la monon. La veturigisto, kiel ŝajnis al li, kiam ekvidis liajn epoletojn, butonojn kaj ordenon, fariĝis senmova. Pustjakov tute kontenta eniris en la domon, Demetante sian pelton en la antaŭĉambro, li ĵetis rigardon en la salonon. Tie ĉe la tablo sidis 15 aŭ pli personoj kaj tagmanĝis. Estis aŭdata interparolado kaj sonoj de vazoj.

— Kiu estas tie? Ha, Leo Nikolájeviĉ! Estu bonveninta; vi malfruis iom, sed tio ĉi ne estas malfeliĉo, ni sidigis antaŭ nelonge.

Pustjakov elmetis sian bruston, levis la kapon kaj frotante la manojn eniris en la salonon. Sed kion li vidis! Ĉe la tablo apud la filino de mastro sidis lia kolego, instruisto de franca lingvo, sinjoro Tremblant. Montri al li ordenon — tio estas malhonori sin por ĉiam. Unua penso de Pustjakov estis deŝiri la ordenon aŭ kuri el la domo; sed la ordeno estis fortike alkudrita al la surtuto,

— la reiro ankaŭ estis neebla. — Rapide kovrinte per la dekstra mano la ordenon, li kurbigis, malcerte faris komunan saluton kaj al nenu donante manon li sidigis sur la seĝon ĝuste kontraŭ sia kolego franca instruisto.

— Kredeble li estas malsobra, — pensis Spiĉkin, rigardante lian konfuzitan vizaĝon.

Oni metis antaŭ Pustjakov teleron da supo. Li prenis la kuleron per la maldekstra mano, sed pensante, ke ne estas konvene manĝi tia maniere, diris, ke li jam tagmanĝis kaj nun ne volas manĝi.

— Mi dankas vin, mi jam tagmanĝis, — murmuris li, — mi vizitis mian onklon, kaj li petis min tagmanĝi kun li.

La animo de Pustjakov sin plenis per premanta sopiro kaj malica ĉagreno. La supo odoris tre agrable, kaj la varma sturgo eldonis tre apetitan fumon. La instruisto provis li erigi la dekstran manon kaj kovri la ordenon per la maldekstra, sed tio ĉi estis maloportuna.

— Oni turnos atenton, kaj tra la brusto estos etendita la mano... Ho Dio! kiam finiĝos la tagmanĝo? Mi manĝos poste en la restoracio.

Post la manĝajo li rigardis timeme la francon. Sinjoro Tremblant, tute konfuzita, rigardis lin kaj ankaŭ nenion manĝis. Ili ambaŭ ankoraŭ pli konfuziĝis kaj rigardis en siajn malplenajn telerojn.

— Li rimarkis, la fripono! — pensis Pustjakov, — el la vizaĝo mi vidas, ke rimarkis. Li estas granda intriganto... Morgaŭ li denuncos al la gimnaziestro.

Oni finis la kvaran manĝaĵon, finis ankaŭ la kvinan.

La alta sinjoro sin levis. Li glatigis sian kapon kaj proklamis:

— He, mi proponas, he, eltrinki por la florado de sidantaj tie ĉi sinjorinoj!

La tagmanĝantoj sin levis kun bruo kaj prenis la pokalojn. La laŭtaj krioj »hura« sonis en ĉiuj ĉambroj. La sinjorinoj ridetis kaj

etendis la manojn kun la pokaloj por alfrapi ilin (*choquer les verres*). Pustjakov sin levis kaj prenis sian glason per la maldekstra mano.

— Leo Nikolajeviĉ, transdonu tiun ĉi pokalon al Nastásja Timoféjevna, — diris al li ia viro donante la pokalon.

Nun Pustjakov devis agi ankaŭ per la dekstra mano. La ordeno kun la ruĝa rubando ekvidis fine la lumon kaj ekbrilis. La instruisto paliĝis, mallevis la kapon kaj rigardis timeme la francon. Sinjoro Tremblant rigardis ankaŭ lin kun granda miro. Liaj lipoj ridetis ruze, kaj de la vizaĝo malaperis la konfuzo.

— Julio Aŭgustoviĉ! — diris la mastro al la franco, — transdonu la botelon.

Tremblant etendis kun ŝanceliĝo la manon al la botelo, kaj . . . ho feliĉo! Pustjakov rimarkis sur lia brusto ankaŭ ordenon, kaj ne Stanislavon, sed Anna'n mem. Sekve, la franco ankaŭ friponis! Pustjakov ridis pro plezuro kaj tute senĝene sidiĝis sur la seĝon. Nun ne estis bezono kaŝi la ordenon. Ambaŭ faris la

saman pekon, kaj neniu denuncos kaj malhonoros la alian.

— Haa! — diris Spiĉkin, kiam li rimarkis la ordenon.

— Jes, — diris Pustjakov, — mirinda afero, Julio Aŭgustoviĉ kiel malmultaj estis la rekompencoj antaŭ nova jaro: ni estas multaj, sed ricevis nur mi kaj vi. Mirinda afero!

Tremblant gaje balancis la kapon kaj elmetis la supran randon de sia surtuto, kie brilis la ordeno de Sankta Anna de 3. klaso.

Post la tagmanĝo Pustjakov promenis en ĉiuj ĉambroj kaj montris la ordenon al fraŭlinoj. Li estis tre gaja, kvankam pinĉis la malsato sub la kaveto de l' koro (*sub scrobiculo cordis*).

— Se mi sciis tion ĉi, — pensis li rigardante kun envio la francon, kiu parolis kun la mastro pri la ordenoj; — mi surmetus la ordenon de Sankta Vladimír!

Nur tiu ĉi penso iam turmentis lin; en ĉio alia li tute estis feliĉa.

Tradukis

V. Laskin.



DIVERSAĴOJ.

Informejo de esperantistoj.

(Sub tiu ĉi rubriko ni presas senpage sciigojn kaj dezirojn de niaj abonantoj. Tiajn enportojn oni adresu al s-ro Paul de Lengyel, en Szegvár, Hungarujo.)

Kolektante ilustritajn poŝtkartojn, prezentantajn *etnografian* intereson, kiuj, por propagandi lingvon Esperanto, estos de mi poste ekspozitaj publike, mi petas ĉiujn geesperantistojn transsendadi al mi tiajn kartojn, precipe kun »tipoj en vestoj naciaj«. Ke oni volu samtempe alskribi apud ĉiu vidaĵo necesajn klarigojn. — Waclaw Woyde (E 3982), Hamburgo, Steindamm 33, II r.



= **Malfacilaŭdemeco.** Riĉa Sinjorino, kiu estis kuracita per la Artaj Oreltamburoj de D-ro Nicholson, donacis al la Instituto la sumon da **Kr. 25,000**, por ke surdaj aŭ malfacilaŭdemaj personoj, kiuj ne havas la rimedojn akiri tiajn, ricevu ilin senpage. — Leterojn oni volu adresi al: *Instituto Nicholson, »Longcott«, Gunnersbury, London, W.*

HUMORAĴO.

DU LAKEOJ.

1-a lakeo: Nu, Ivan, kiel vi fartas?

2-a lakeo: Ho, tre bone. Mi trovis nun bonegan lokon: mia sinjoro havas nur unu piedon, kaj tial mi devas purigi nur unu boton.

KLERA SERVANTINO.

Sinjinoro venis en la ĉambro de la servantino kaj, trovinte tie viron, kolere diras al ŝi:

— Kio estas tio ĉi?

La servantino respondas:

— Tio ĉi estas ne *kio*, sed *kiu*.

REEN.

La servantino: Sinjoro, kial vi donis al mi ne sufiĉe bonan ateston?

La sinjoro: Kia estas la homo, tia ankaŭ estas la atesto.

La servantino: Jes, vere! Kia estas la sinjoro, tia estas la atesto.

EN RESTORACIO.

La sinjoro: Bufedisto, en la pasteĉo, kiun vi donis al mi, mi trovis ĉifonon. Kion tio ĉi signifas?

La bufedisto: Pardonu, sinjoro, mi ja ne povas por 10 kopekoj doni pasteĉon kun veluro.

EN LOMBARDO.

La prodonanto: Sinjor' kasisto, mi ja prodonis al vi pelton kun fela kolomo, kaj jen, mi ricevis ĝin reen sen kolomo. Kie do estas la kolomo?

La kasisto: Ĝin ekmanĝis la tineo.

M. S. Rakitski.

Rebusoj.

— De K. Boguŝeviĉ. —

I. — Kia floro estas samtempe participo-substantivo de verbo?

II.

III.

IV.

U L	Ju 0 0 0 0 0 0 0 0 0 0 0 0	at b e e e e e e e e
-----	--	----------------------------

La solvojn de tiuj ĉi rebusoj ni presos en la n-ro 3. Ni petas tiujn inter la legantoj, kiuj sin interesas pri tio, ke ili alsendu la solvojn al la administracio de nia gazeto. La nomojn de la solvintoj ni presos kune kun la solvoj mem.

La solvojn de la rebusoj trovataj en la antaŭlastaj numeroj de nia gazeto ensendis ankoraŭ: E. Mankovskaja kaj Vjaĉeslav Gedroic.

ANONCOJ.

ARVIDSVIK

... KURACEJO ...

sur la sveda, insulara bordo de l' Norda Maro,

kaj tial prezentanta freŝan, neŝanĝeman klimaton, bonegajn okazojn por velado, fiŝkapto k. t. p., sin oferas al malsanuloj kaj serĉantoj rekreacion. — *Sezono*: 6 junio — 1. septembro. Por mendi ĉambrojn kaj por ĉiuj pluaj sciigoj volu adresi:

**Kamrerarekontoret, Arvidsvik
Marstrand (Svedujo).**

Oni korespondas kaj parolas Esperante.

Anna Krikortz.

ESPERANTISTO,

sciante bone praktike la lingvon Esperanto, kaj sperta en skribaj laboroj, serĉas ian oficon por labori speciale en Esperanto. Preta veturi en ĉiujn finojn de l' mondo por servi per Esperanto al Esperanto. — Adreso:

**ODESSA (Rusujo), al A. Miropolski,
Mjeŝĉanskaja strato D. N° 7.**

Signetojn Esperantistajn mi pretigas nun nur el arĝento kaj kostas la ekz. rubl. 1.50 sen transsendo. *Signetojn el kupro mi ne pretigas pli.*

Juvelisto H. ŠTALBERG, Vezenberg (Estl. gub.) Rusujo.

Esperantistoj!

Disvastigante la konadon pri Esperanto oni akcelas la tutan aferon Esperantan. Unu maniero estas uzi ĉiam propagandajn kovertojn. Tiaj en sveda lingvo estas riceveblaj en **Svedujo** ĉe la Klubo Esperantista Upsala, en **Finlando** ĉe s-ro Aug. Th. Laurén en Jyväskylä, kaj kostas nur

kr. 1.— (Fmk. 1:40 p.)

po 100, — al kio sin a'metas la poŝtopago.

RESTANTAJ JARKOLEKTOJ de la »Lingvo Internacia« 1899 (malgranda nombro) estas riceveblaj ĉe mi. — Kosto: svedaj kronoj 1.50 = frankoj 2.—



Hjalm. Bäckström, Örnsköldsvik (Suède).

Finlandaj esperantistoj,

kiuj intencas akiri amatorajn fotografiajn aparatojn, estas petataj observi, ke tiaj, kune kun necesaj hemiaĵoj kaj uziloj, estas akireblaj ĉe ni je moderaj prezoj, krom kio al esperantistoj estas permesata rabato da 5%.

Postulu kostotabelojn!

Jyväskylän Rohdoskauppa
en Jyväskylä.

Ĉe la **Klubo Esperantista** en *Upsala* estas aĉeteblaj:

Jarlibro Esperantista 1897, eldonita de la Societo *Espero* en S. Peterburgo. Kostas 1 frankon.

Libro de l' Humoraĵo, de *Paul de Lengyel*. Tre rekomendinda verko, precipe uzebla kiel ekzerca lego de komencantoj. Kosto 3 frankoj.

PRESEJO

por Esperantistoj
(M. MOLNÁR)
en Szegzárd, Hungarujo



Rapida
servo!



Modernaj
literoj!



Bona laboro!



Moderaj
prezoj!



Adreso:

PAUL DE LENGYEL

Hungarujo.

Szegzárd.

.....oo.....oo.....
ooooo Volu peti modelon! ooooo
.....oo.....oo.....

Ni rekomendas nian servadon precipe al esperantistoj; la presejo posedas literojn akcentitajn por nia lingvo.

Ni entreprenas

la faradon de ĉiuspecaj presajoj en ĉiuj lingvoj, kiuj uzas latinan (antikvan) aŭ germanan (frakturan) literon.

